# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo septembro 2017**

## PRETIGO DE LA VENONTJARAJ KONGRESOJ EN MADRIDO

Kiel ni informis en pasinta numero, en julio 2018 estos organizitaj du gravaj kongresoj en Madrido. La 77-a Hispana Kongreso de Esperanto, okazos inter la 20-a kaj 22-a de julio, invitite de Madrida Esperanto-Liceo (MEL). La 51-a kongreso de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) disvolviĝos inter la 21-a kaj 28-a de la sama monato profitante ke la Universala Kongreso okazos en Lisbono fine de julio kaj komence de aŭgusto tiujare.

Dum venontaj tagoj oni planas diversajn kunvenojn por komenci la organizadon de ambaŭ kongresoj kaj aliaj eblaj aktivadoj dum tiu monato. Ni petas la kunlaboron de ĉiuj madridaj esperantistoj por dividi la laboron. Mankas ankoraŭ multaj detaloj, kaj do ĉiu (sin)propono estas bonvenigata.

Dum la komenco de septembro troviĝos en Madrido la respondeculo pri kongresoj de ILEI, Radojica Petrović, kiu vizitos la instalaĵojn kaj kunvenos kun la madridaj esperantistoj.

La unua kunveno okazos la sabaton, 2-an de septembro, vespere je 17,30, profitante la unuasabatajn renkontiĝojn en Café Madrid (strato Mesón de Paños, 6, metrostacio Ópera), kiam ni babilos kaj neformale rendevuos.

Radojica prelegos pri ILEI, en la sidejo de MEL la lundon 4-an, vespere je la 19,00 horo (la sidejo estos malferma jam de la 18,30). Poste oni malfermos kolokvon kun la publiko.

Sekvos kunvenoj jam pli formalaj kun organizantoj kaj aliaj respondeculoj dum la sekvaj tagoj, do bv. kontakti se vi deziras kunlabori kaj ilin ĉeesti.

Radojica krome planas viziti la urbon, kaj do se vi deziras akompani lin, bv kontakti kun MEL aŭ kun la sociaj retoj por koni la detalojn. Ĉiuj aliaj helpoj, el dizajnado ĝis diskonigo estas bonvenaj. Bv. skribi al la adreso de MEL kun viaj ideoj kaj proponoj.

## PARTOPRENO DUM LA EŬROPA SEMAJNO DE LA LINGVOJ

Kiel tradicie, en la fino de septembro oni festas la Eŭropan Tagon de Lingvoj. En Madrido, la asocio de naciaj lingvaj kaj kulturaj eksterlandaj institutoj (EUNIC) organizos aktivaĵojn pri lingvoj dum la tuta semajno, senpagajn kaj malfermajn al la publiko.




Ĉijare, pere de la kunlaboro de HEF kun la Pola Kulturinstituto en Madrido, Esperanto havos rolon kiel alia normala eŭropa lingvo. Konkrete, la 29an de septembro, en la sidejo de la Germana Goethe-Instituto, oni organizos mikrokursojn de diversaj lingvoj, inter kiuj ankaŭ de la internacia. Ili estos kursoj de po 25 minutoj, ĉiun duonhoron, de la 17a ĝis la 20a

horo, dum kiuj ni montros la bazon de la lingvo. Ni profitos la okazon por disdoni alian materialon kaj ĝenerale kontentigi la scivolemon de la interesatoj.

Vidu detalojn ĉe: http://eunic-espana.eu/viernes-29-dia-europeo-de-las-lenguas-2017-6a-edicion/, kie aperas la programo ankaŭ de la ceteraj tagoj, kaze ke vi interesiĝas ĝenerale pri lingvoj.

## INTERNACIA SEMAJNO DE KULTURO KAJ TURISMO

Dum la 25-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo, kiu okazos de la 30-a de septembro ĝis la 7-a de oktobro 2017 en urbo Tossa de Mar ("Costa Brava", Katalunio), oni aljuĝos la Premion Ada Fighiera-Sikorska, al madrida esperantisto, membro de MEL, Ana Manero.




Temas ĉijare pri jubilea Semajno, kun nova skipo. Dum ĝi oni planis omaĝi la antaŭan ĉeforganizanton, Luis Serrano, kiu bedaŭrinde forpasis fine de aŭgusto.

En la programo oni antaŭvidas prelegojn de José Antonio del Barrio, Luz Vázquez, Thierry Saladin, Gian Carlo Fighiera, Aldis Bušs, plus aliajn sub la formo de peĉakuĉo. Okazos ankaŭ turismaj vizitoj, debatoj, folkloraj vesperoj, kursoj, aŭkcioj, kvizoj kaj aliaj aktivadoj.

Por informiĝi kaj aliĝi, jen la koresponda adreso: Rosa López, strato Granollers, 3,-13º- 3ª, ES-08225 Terrassa (Barcelona, Hispanio). Por retaj demandoj, skribu al: marilo1950@hotmail.es. Aliaj informoj ĉe: https://kulturacentro.blogspot.com.es/.

Por monato oktobro oni kunvokis du aliajn rendevuojn. La Andaluza Kongreso de Esperanto okazos de la 12a al la 15a de oktobro en la urbo Torrox. La Kataluna Kongreso okazos en Àger-Montsec, en la samaj datoj. Ni informos pli detale en venonta numero.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazos ĉiulunde post la 18,30.

Ni reprenas la unuasabatajn renkontiĝojn en la kafejo Café Madrid, en la strato Mesón de Paños, 6 (tiu estas centra strato, kiu iras el Ópera al la placo Mayor). Temas pri kafejo kie ofte okazas rendevuoj internaciaj, kaj do ideala ankaŭ por komencantoj. Kiel komentite, ni rendevuos la venontan 2-an de septembro je la 17,30.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la liston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com